



# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 2 No. 6

Official Organ of the Esperanto League for North America

Nov.-Dec., 1954

## UNESCO DECIDES FOR ESPERANTO

### The 8th General Conference in Montevideo Recognizes the Value of Esperanto for Science, Education and Culture

From Heroldo de Esperanto

The General Conference of Unesco, which took place in Montevideo, Uruguay, has made certain decisions regarding the international language. First, the Administrative Commission of the Conference has unanimously accepted the Universal Esperanto Association as a consultative organization of Unesco. This means that the ties between both world organizations are now firmer than previously, and that the UEA will be consulted in all matters relating to the problem of a common language in international relations. This particularly concerns intellectual interchanges and the spreading of culture.

The Conference has further recognized, on the basis of a report of the Director General of Unesco, that a number of states have expressed their willingness to introduce Esperanto into their schools or to widen the already existing program of Esperanto in their curricula. A number of documents of the General Conference recognize the merits of the Esperanto movement for bringing together the peoples of the world, for the spreading of culture and for the realization of the aims and ideals of Unesco.

The acceptance of UEA as an associated organization with consulting status occurred on Nov. 25 by unanimous vote of the Administrative Commission, and was confirmed by the plenary session on Dec. 6 by the acceptance of the report of the work of the Administrative Commission.

Undoubtedly this decision has great significance for the UEA and for the entire world-language movement. But even more important was the acceptance of a resolution, proposed by the Mexican delegation, in the meeting of the General Conference on Dec. 10, 1954, at 5:30 p.m., in the Grand Hall of the Legislative Palace in Montevideo, by a vote of 30 to 5, with 17 abstentions.

The Resolution as accepted does not mean victory for the world-language idea, nor does it bring about the introduction of Esperanto in the schools throughout the world; it will not work any miracles, as may have been expected by some at the time when the international Petition for Esperanto was first set up; but it does represent an important step on the way toward that victory, toward

**This issue of the Review was delayed in order to report on the Unesco Conference in Montevideo.**

the general introduction of Esperanto into the schools, and the final solution to the language problem for all time.

Here is the actual text of the Resolution (unofficial translation), which bears the number 8C/DR/116:

The General Conference, after discussing the Report of the Director General regarding the international Petition for Esperanto,

1. notes the results attained by Esperanto in the field of international intellectual interchanges and for bringing the peoples of the world closer together;
2. recognizes, that these results correspond to the aims and ideals of Unesco;
3. commissions the Director General to further follow the experiences presented by the utilization of Esperanto for education, science and culture, and to that end to cooperate with the Universal Esperanto Association in all matters which interest both organizations;
4. notes that a number of member-states have declared themselves ready to introduce or widen the instruction of Esperanto in their elementary or superior schools, and invite those member-states to inform the Director General of the results attained in this field.

EXECUTIVE BOARD DECISIONS

Konstante Portu la Verdan Stelon

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The Review reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

**Addresses:** Subscriptions and bulk orders should be sent, with payment, to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: David B. Richardson, 3412 No. Mullen, Tacoma 7, Wash.

**Deadlines:** The Review is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the editor no later than the 15th of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. **President:** John L. Lewine, 52 Riverside Drive, New York 24, N. Y.; **Vice-President:** James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; **Secretary:** Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; **Treasurer:** Edward W. Pharo, Jr., "Nur," County Line Rd. and Simms, Somerton 16, Pa.; **Chairman, Executive Board:** F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash.

**Membership Dues:** Regular Member, \$3; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member but receiving only one copy of publications, etc., \$4.

Make checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

IMPORTANT

Note these two changes of address: Esperanto League for North America Meadville, Pa.

North American Esperanto Review 3412 No. Mullen St. Tacoma 7, Wash.

Some members are continuing to use the League's old address (123 E. 35th St., Brooklyn 3, N. Y.) This causes delay and extra expense to the League. Please use the current address whenever you write to the League, or in giving the League's address in your publicity activities.

Also note that orders for extra copies of the Review, and for subscriptions, can now be sent directly to the editor (note new address). Checks and money orders for such purposes should be made out to: North American Esperanto Review.

1. That the Treasurer be directed to transmit to the Editor funds with which the Review is to be published. Such funds shall be made available to the Editor in advance of each publication date, and shall include all moneys earmarked by the budget for the Review, money received in payment for subscriptions-only and for bulk orders, and 50¢ for each new or renewed membership. The Editor shall make bi-monthly accounting statements to the Treasurer regarding his handling of League funds.

2. Appointed S-ano Adrian Hughes to the Executive Board position vacated by the death of S-ano Bovit.

3. That the Editor may draw in advance the funds allocated to the Review for the first 6 months of 1955.

The Publicity Committee Chairman, Adrian Hughes, 476 So. Bailey Avenue, Hillsboro, Ore., needs the help of every member of ELNA. What can you do to help? Write now!



HOW TO LEARN ESPERANTO

If there is a local class in Esperanto—join it. Write the League for the address of the group nearest you.

If there is no class nearby you can study at home, order one of these textbooks:

- The Esperanto Teacher \$ .45 (or)
  - Nelson's Esperanto Course 1.50
- Then;

Join the League; you will be entitled to free instruction by correspondence. For further information on correspondence courses write to: Louis Dormont, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N. Y. Order books from: Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.

Membership includes subscription to the North American Esperanto Review.

- Regular member \$3.00
- Sustaining member 5.00
- Patron member 10.00
- Life member 50.00
- Man and wife 4.00

(both regular members with voting privileges but only one copy of the Review).

Send remittances to the Esperanto League for North America, Meadville, Pa. Make checks or money orders payable to: Esperanto League for North America.

As an American soldier in Europe in 1945 and 1946, I had many opportunities to visit the city of Paris, and learned to find my way around fairly well. In 1951, having return to Europe with my wife, we planned a week's vacation in Paris and I supposed that I would remember the once familiar streets and landmarks. However, minutes after arriving at the Gare de l'Est, we were as hopelessly lost as any tourist arriving there for the first time. We stopped in our tracks, set down our luggage and looked bewildered.

But only for a moment. Almost instantly, in fact, we were approached by a young boy on a bicycle who asked me, in perfect Esperanto, if he could be of service. A few minutes later we were on the Metro train and on the way to our hotel.

The young boy knew we were Esperantists because of the green stars we wore. Without those badges of the Esperanto fraternity, though of course we would eventually have found our way to the hotel, we could easily have felt annoyed and friendless: strangers in a foreign place. Instead, our introduction to Paris was a happy one which put us in the proper mood to enjoy that wonderful City of Cities.

D. B. R.

U. S. Treasury Says Donations to ELNA Deductable

The Esperanto League has received notification from the U. S. Treasury Department that donations to it are deductible by the donors when computing taxable income. Remember this when preparing your 1954 return.

The League is further advised that "bequests, legacies, devises or transfers to (the League) ... are deductible in computing the value of the taxable estate of a decedent for Federal estate tax purposes."



ADVERTISE IN THE REVIEW  
One page . . . . . \$20.00  
Half page . . . . . 10.00  
Quarter page . . . . . 5.00  
One column . . . . . 7.00  
Half column . . . . . 3.50  
Quarter column . . . . . 1.75  
Eighth column (7 lines) or less . . 1.00  
Extra charge may be made for cutouts special material which increases cost.

## NI BEDAŬRE ANONCAS

ke mortis William George Adams, pioniro de nia movado, je la 24a de novembro, 1954, en Bremerton, Wash. Li havis 68 jarojn.

S-ano Adams lernis Esperanton en 1903 kaj estis unu el la unuaj du Esperantistoj en Norda Ameriko. Li kunlaboris je la eldono de la *Enciklopedio de Esperanto*, 1933, redaktante la parton pri Usono. Li instruis ĉirkaŭ 20 Esperanto-klasojn; multaj Esperantistoj en ĉi tiu mondparto, tre eble la plejparto da ili, lernis de S-ano Adams aŭ de iama studento lia.

S-ano Adams ĉeestis Universalajn Kongresojn de Esperanto en Washington, D. C., 1910, kaj Bourne-mouth, 1949. Li estis konstanta ano de la Brita Esperantista Asocio, kaj membro de la Lingva Komitato de 1909 ĝis 1912. Li fondis la Societon Esperantistan de Seattle kaj servis

kiel ĝia sekretario de 1906 ĝis 1908. Dum multaj jaroj li estis ano de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko, servante en diversaj oficoj kaj kun pluraj komitatoj de tempo al tempo. En la lastaj jaroj li estis ano de la Esperanto-Ligo, Estrarano, kaj kunlaboranto de la *Revuo*.

Li tradukis multajn poemojn, kantojn, kaj prozaĵojn en Esperanton, inkluzive de "Piramo kaj Tizbeo", "Stelplena Standardo", "Patrujo Nia", kaj "Napolaj Noktoj".

S-ro Adams antaŭe laboris kiel polica detektivo en Seattle. Li pensiatigis en 1948. Post plurmonata mondvojaĝo li faris sian hejmon en Kingston, Wash., apud la Marbrako Puget, kiun li amis. Li loĝis tie ĝis sia morto, kiu sekvis nelongan mal-sanon.

Li longe laboris. Nun, li havu pacon.



William George Adams

## IFESA

George G. Iggers, Philander Smith College, Little Rock, Ark., is the North American *peranto* for IFESA (Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj), the international Esperanto students' organization. Membership (including subscription to the magazine *La Studento*) is \$1.50 per year; subscription alone is \$1.00.

## 1955 Congress

The Membership Committee, Chairman Armin F. Doneis, P.O. Box 105, Pharr, Texas, still wants bids for the 1955 Congress. *Write now!*

This committee also wants to help any work of local or regional organization for Esperanto. If you aren't working to build up your local or regional Esperanto movement, get busy! We'll help.

## ANONCOJ

*Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ pli-foja apero. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.*

**ESPERANTAĴOJ.** Pro trokresko de mia kolekto mi deziras vendi Esperanto-gazetojn kaj librojn. Seriozaj intereso-atoj bonvolu skribi al Dr. W. Lippmann, 1021 E. 14th St., Brooklyn 30, N. Y.

Novel, fun-packed way of playing correspondence chess. Mimeo pamphlet in English or Esperanto, only 25c. Write: "Chess," 2846 S. E. 136th, Portland 66, Ore.

## PATRUJO NIA (America)

Patrujo nia, vi  
Libera lando, mi  
Prikantas vin.  
Ho, ĉiu enloĝant'  
Kaj ĉiu pilgrimant'  
Aliĝu al la kant',  
Laŭdante vin.

Konstanta en batal'  
Por bela ideal',  
Antaŭen ho!  
Land' de la liberec',  
Por homa amikec',  
Feliĉo kaj justec',  
Laboru do.

Frateco ĉe homar'  
De l'Esperantistar'  
La glora cel'.  
Do forte en naci'  
Prosperu ĉiam pli,  
Briladu inter ni  
La verda stel'.

W. G. Adams

## LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezentado kaj komentario de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906—388 paĝoj  
2a volumo, 1906-1914—374 paĝoj

Nuna prezo: Ĉiu volumo \$ 2.25

*Mendu de:*

Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

# ESPERANTO IN NORTH AMERICA

News-notes from around the United States and Canada

## West Virginia

Two extremely successful displays were held in this area during the past months: at Charleston, West Virginia, in the Kanawha County Public Library, from May 15 through July 1, and in Huntington, West Virginia, from September 15 to November 1. Each display received excellent publicity from local newspapers and both were well visited by the public. Numerous requests from persons wanting more information about Esperanto have been received by the League as a result.

These displays were shown through the efforts of Roland W. Ruff, and are particularly interesting because they have set the standard for other displays to be sponsored by other Esperantists and clubs throughout the country. Mr. Ruff is convinced, on the basis of his experiences in Charleston and Huntington, that such displays can be made interesting and do bring results. It is hoped that this type of publicity will be used much more in the future.

Items shown included a sampling of current best-selling Esperanto books, some of which were furnished by the League and others by Glenn Turner; books and magazines from other countries, loaned by Helene Wolff; keys and advertising material sent in by Adrian Hughes; and other material furnished by Conrad Fisher, John Rickey, Elwyn C. Pollock, and others.

For information and assistance in preparing an Esperanto display in your area, write to Adrian Hughes, 476 S. Bailey Ave., Hillsboro, Ore.

## Boston

Mr. Llewellyn Jones, well-known translator of the Scandinavian languages who recently became an Esperantist, lectured before the Humanist World Fellowship of Boston on Oct. 22. The subject was, "Can we unite on a universal language?"

## Television

Sunday, Nov. 7, on the CBS television program "What's My Line?" guest Dick Powell so disguised his voice that panelists complained they couldn't understand him. "What's the matter?" quipped emcee John Daley, "Can't you understand Esperanto?"

## Los Angeles

At the November meeting of the Los Angeles Esperanto Club members were pleasantly surprised by the unexpected visit of Dr. Hideo Yagi of Japan. Dr. Yagi attended an international conference of physicians in Geneva, Switzerland, last summer, as the official representative of the Japanese government. Dr. Yagi visited a number of European countries after the conference was over, and attended the Universal Congress of Esperanto in Haarlem. His visit to this country was arranged by the Rockefeller foundation.

Dr. Yagi is a fluent Esperantist, and the Los Angeles group enjoyed very much hearing details of his world trip. At the meeting he was elected an honorary member of the club.

The anniversary of the birth of Dr. Zamenhof, creator of Esperanto, was celebrated by the Esperanto Club of Los Angeles in a well-known Hollywood restaurant. Among the many persons who attended as guests were two young students from a suburban high school where they are members of a new group formed by Jehiel Davis.

One of the more prominent guests was Dr. Cedol, who related the difficulty with which he was able to come into contact with the Los Angeles Club. Dirk Brink, our Los Angeles correspondent, suggests that a listing should be made with the telephone company in each city, in order that they can give a telephone number to persons calling "information" regarding Esperanto.

*(It is also desirable to list the local club's address and phone number with the local public library, where people also frequently call for information about local Esperanto activities. Ed.)*

## San Francisco

Esperanto materials were displayed at a folk dancers' hobby show by Jo van Zvol on Nov. 7, at which many persons heard about Esperanto for the first time.

On Nov. 20 Dr. Hideo Yagi, of Okoyama University, Japan, addressed a luncheon meeting of San Francisco and Sacramento Esperantists.

## Portland

An intensive publicity campaign which Portland Esperantists have been carrying on since early this year is producing results. A number of letters-to-the-editor have been published by leading newspapers, with many inquiries resulting. On Nov. 11, radio station KEX broadcast much pertinent information about Esperanto on the program "Party Line."

## Pacific Northwest

The Pacific Northwest Esperanto Federation is now organized, according to a letter received from Jay Barry, Organizing Secretary of the PNEF. The Constitution draft which has been presented to persons eligible for membership provides for two officers, a Secretary and a Treasurer, each of which will serve one-year terms. Election of the first officers will be held in the near future.

## Esperanto Pennants




Pennants like the one pictured here are now available from the Esperanto League Book Service. Approximately 3 feet long, made of green felt. \$2, postpaid.

Los Angeles Club's Zamenhof Day Banquet



Above: Joseph R. Scherer addresses the Club. Left to right are: Mr. and Mrs. Charles Chomette, Mr. Scherer, Edward Kalmar, and Mrs. Donald Parrish. Below: Charles Chomette speaks. Others in the picture: in foreground, at the right of the table, Mr. and Mrs. Dirk Brink.



Bona Propagando — Malgranda Kosto

Abonu la Revuon donace por altlernejoj, publikaj bibliotekoj, senatanoj, kongresanoj kaj aliaj instancoj kaj institucioj, kaj por influhavaj personoj. Per \$3.00 vi povas prezenti unujarajn abonojn al 10 lernejoj, bibliotekoj aŭ eminentuloj. Proponu tion ĉe vi grupo.




When you pass an old book store, walk in and ask if they have any Esperanto books. Quite often you may find useful and hard-to-get books at very reasonable prices.

Du tre havindaj libroj:



*Eldomita de Heroldo de Esperanto. 260 paĝoj, tuttote bindita, kun ora surpriso. \$1.65 aŭfrankite.*



*El la ĉeĥa lingvo tradukis Tomáš Pumpr. Ilustrita per 53 desegnoj de Josef Lada. Eldono de "Stafeto". 144 paĝoj, paperbindo. \$1.50, aŭfrankite.*

Mendu de:  
Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

# ESPERANTO ★ TUTMONDE

laŭ arango kun HEROLDO DE ESPERANTO



## Vokas dononjon.

Adreso: CIT, Piazza Nettuno 2, Bologna, Italujo.

**Nova Peranto:** La nederlanda asocio LEEN komisiis la perdon de kotizoj al s-ro J. Telling, Schietbaanlaan 106 a, Rotterdam C.

**Karavanojn aranĝas:** Aŭstria Esp. Federaĉio, Fünfhausg. 16, Wien 15, Aŭstrio; Flandra Ligo Esperantista, Postbus 100, Mechelen, Belgujo; Brita Esp. Asocio, 140 Holland Park Ave., London W. 11, Anglujo; S. K. Nielsen, Havepladsvej 129, Fredericia, Danlando; CDEL's kongresrejsse-avdeling, Pr. Jørgensgade 4 A II, København, Danlando; M. Fouski (por Instr. Asocio), 22 rue Gauvin, Angers, Francujo; Carl Barthel, Wöhlerstr. 14, Frankfurt a.M., Germanujo; J. Telling, Schietbaanlaan 106 a, Rotterdam C, Nederlando; Philips Esp.-Klubo, Zonne-roosstr. 10, Eindhoven, Nederlando; F-ino V. Birkevold, Hjelmelandsgt. 77, Stavanger, Norvegujo; Sveda Esp.-Federaĉio, Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.

**Fervoja rabato:** La itala fervoja instanco jam decidis doni rabaton de la vojaĝkosto sur enlandaj fervojoj okaze de la kongreso (al kaj de Bologna). Detaloj sekvas.

**Folkloro Vespero:** Kun celo aranĝi Folkloran vesperon la LKK invitas grupetojn anonci sin por prezento de unu reprezenta popoladanco de sia lando. Pri detaloj informiĝu ĉe LKK.

**Kongresaj fotoj:** Kun la celo doni al la Kongresa Libro jubilean karakteron, la LKK petas alsendon de bonaj kaj klaraj fotoj el la fruaj kongresoj. La fotoj estos nepre resendataj post uzo. Kun la foto estu klare skribitaj detaloj pri personoj, lokoj, dato kaj la nomo kaj adreso de la sendinto.

**Statistiko** (ĝis fino de novembro): Argentino 1, Aŭstrio 4, Belgujo 3, Brazilo 3, Britujo 30, Danlando 6, Finnlando 4, Francujo 20, Germanujo 18, Hispanujo 3, Italujo 33, Jugoslavio 10, Nederlando 19, Norvegujo 3, Novzelando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 18, Svislando 9, Usono 3. — Sume 213 el 20 landoj.

## Baldaŭ aperos ampleksa Scienca kaj Teknika Terminaro (STT).

Gi efektiviĝis en la daŭro de la lastaj sep jaroj, verkita de dipl. ing. R. Haferkorn kaj kem. D-ro K. Dellian, kaj kontrolita de Prof. D-ro F. J. Belinfante, laŭ la modelo de la Plena Vortaro de SAT, kaj ĝi povos servi kiel ties suplemento. La enhavo estas laŭalfabeta; Esperanta termino kun difino en Esperanto kaj, kie necesas, kun traduko en la lingvoj germana, angla, franca, se necesas ankaŭ kun la indico de la Universala Dekuma Klasado. La terminaro enhavas ĉ. 5100 terminojn. Gi aperos en formo presita kaj bindita. Por certigi ĝian baldaŭan aperon (ĝi estas eldonota en Japanujo), oni bezonas antaŭmendojn. La antaŭmenda prezo estas egalvaloro de 3 usonaj dolaroj. Mendu ĉe: Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), s-ro Rudolf Haferkorn, Königseer Str. 50/o, (13b) Berchtesgaden, Germanujo.

## Filmo kun Esperanto-dialogoj:

### „Falinta el la ĉielo.”

„Falinta el la ĉielo” — ĉu eble meteoro kun dimensioj neniam viditaj? Ĉu legenda loĝanto de Marso, alteriĝinta en sia fluganta telero sur nia planedo por prudentigi nin? Ne, vi tamen ne divenos.

La filmo „Falinta el la ĉielo” ludas en usona legacio ie en orienta aŭ sudorienta Eŭropo. Malgranda legacio sen ia „komforto”, — nur ses viraj diplomatoj, sen inoj, kaj kiam eĉ la indiĝena kuiristino mistere malaperis, ili vidas sin forlasitaj al fraŭleca vivo pli kaj pli netolerebla, ĝis ...

Jes, ĝis iutage okazis tio, pri kio temas la titolo: „Falinta el la ĉielo”. En tulipa bedo de la legacia parko, kiu estas ĉirkaŭita per dika muro, oni trovas ion, kio evidente venis tien „de supre”: bebano!

Telegrafinte al Vaŝingtono, ambasadoro Adams (Joseph Cotten) ricevas de la Ministerio de Eksteraj Aferoj la permeson doni al la juna terciitano azilon.

En kortusa senhelpeco la tuta legacio klopodas trovi sekajn vindaĵojn kaj uzebajn laktobotelojn por la ĉieldonaco, sed la eta Sam laŭvoĉe protestas kontraŭ tiu nefakula traktado.

Tiam la kontraŭladanto de Adams, Kovac (René Deltgen), sendas en la legacion la vartistinon Sonja (Eva Bartok). Kaj moliĝas la malmolaj diplomatoj. La ambasadoro mem enamigis je la juna vartistino. Des pli li disreviĝas, eksciante, ke ŝi donis al Kovac informojn pri detaloj koncerne la bebano, konataj nur al la plej intima rondo. Ĉu do spionino? Kiel la bebo-epizodo bloviĝas je politika afero, pleninganta la kolonojn de la gazetaro, kaj kiel plu disvolviĝas tiu komedio, — nu, tion vi mem konstatu, kiam vi vizitos la filmon.

Esperanton oni uzis (por kelkaj dialogoj), por eviti, ke aŭskultanto kombinu la scenejon de la filmo kun iu difinita lando, kio certe okazus, se oni igus paroli la loĝantaron en nacia lingvo.

## La neatendita okazis:

### Finna Radio elsendis pri Esperanto.

La neatendita okazis — dank' al Unesko! La 21-an de novembro je 21.15 h. Finnlanda Radiostacio sendis programon pri Internacia Lingvo, el propra iniciato, okaze de la ĝenerala kunsido de Unesko, kiu pri-traktas la problemon pri Esperanto kiel internacia lingvo.

La programo 25-minuta konsistis el enkonduka historieto pri la internacia lingvo fare de mag. O. Viio, interesato pri la problemulo sed ne-esperantisto. Poste li turnis sin al mag. Vilho Setälä kaj petis lin legi specimenon el la Esperanta traduko de „Sep-Fratoj”, kaj faris al li kelkajn demandojn pri la Esperanta movado. Post tio li deziris aŭskulti interparolon en Esperanto kaj petis mag. Setälä fari kelkajn demandojn al ĉeestanta brita civitano R. Milton pri liaj vojaĝoj kaj la utileco, kiun Esperanto alportis al li. La interparolado estis aŭdata en Esperanto kaj en finna traduko. Nun sekvis intervjuo de lingvisto, Prof. Aalto, kiu konvinke pruvis la necesecon de komuna lingvo precipe por scienco kaj montris, ke nacia lingvo ne estas uzabela por tio. Li ne menciis Esperanton kaj lasis siaparte la praktikan solvon netuŝita, sed tute pozitive raportis pri la atentenda solvo. Fine s-ro Viio resumis per kelkaj vortoj la opiniojn de kontraŭuloj kaj de subtenantoj de enkonduko de internacia lingvo.

La tuta programo estis fakta propagando por Esperanto kaj, konservante la sintecon plene „neŭtralan”, efikis pli konvinke ol povus ia simila propagando, aranĝita de esperantistoj.

## Esperanto uzota en grava internacia Ekspozicio.

La Aŭstralia Asocio de Model-Societoj aranĝos dum aŭg.-sept. 1955 sian 5-an grandan Internacian Foiron de Modeloj en Melbourne. Ĝi okazos en la plej granda ekspoziciejo de la suda duonsfero, kaj oni atendas proksimume 250.000 vizitantojn. La organizantoj disponigos al Aŭstralia Esperanto-Asocio senkoste grandan standon, kie oni montros modelojn ensenditajn de esperantistoj tutmondaj.

La organizantoj serĉas bonajn modelojn de ŝipoj, vagonaroj, aŭtomobiloj, motorboatoj, aeroplanoj kaj aliajn modelojn, kiuj respeguligos naciajn karakterojn. Car nur malmultaj model-konstruantoj estas samtempe ankaŭ esperantistoj, ni petas, ke lokaj samideanoj kontaktu kun lokaj modelkonstruantoj kaj informu ilin pri la ekspozicio. Modelojn kun priskriboj (en Esperanto) oni sendu ĝis la 15-a de julio 1955 al: Aŭstralia Esperanto-Asocio, Box 2122 T, Elizabeth St., Melbourne, Aŭstralio.

Bonvolu noti, ke ordinara marpoŝto daŭras al Aŭstralio proksimume 8-10 semajnojn. La organizantoj pagos la koston por resendi la modelojn post la ekspozicio.

Ni estas certaj, ke ĉiu Esperanto-organizaĵo povos helpi kontakti model-konstruantojn kaj tiamaniere pruvi, ke Esperanto povas ludi gravan rolon en internaciaj aferoj. Nur tre malofte ni havas la eblecon partopreni en tiel granda entrepreno (30 nacioj partoprenos).

# HEROLDO DE ESPERANTO

## DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

### Prezoi:

Abono tutjara .....	\$4.00
Abono januaro-junio .....	2.50
Abono julio-decembro .....	2.00
Abono subtenanta .....	8.00
Anonceto po 25 vortoj .....	.50

### Nordamerika peranto:

★ Donald E. Parrish  
328 West 46th Street  
Los Angeles 37, Calif.





(Kliso: Raittuden Ystävät, Helsinki.)

### S-ano Elmi Tamminen, unu el la plej aktivaj finnaj geesperantistoj.

La 18-an de oktobro 1954 mortis en Helsinki emerita instruistino Elmi Tamminen. En pli fruaj jardekoj ŝi estis unu el la plej aktivaj geesperantistoj de sia lando. Ĝis la morto ŝi estis homo, kiun ĉiuj ŝatis pro ŝiaj helpemo kaj trankvila humoro. S-ano Tamminen postlasis internacian „popoleton” da naciĉestaj pupoj, kiujn ŝi estis kolektinta per Esperanto, subtenate de siaj diverslandaj geamikoj. Certe multaj malnovaj legantoj memoras la kamaradinon de iamaj vojaĝoj aŭ korespondoj, kaj eble sur la kliŝo iuj rekonas pupojn, kiuj iam estis iliaj propraj.

### KELI —

#### mŝtera logaĵo en la svedaj elektoj.

Tom amuza evento okazis en la propaganda milito antaŭ el la svedaj komunumaj kaj guberniaj elektoj (indirekte al la Supra Cambro) la 19-an de septembro, evento pri kiu la ĉefrolantino eksciis nur preskaŭ du monatojn poste. En la gubernio de la insulo Gotland ludis la reputacio de KELI certan misteran rolon en la propagando de la Popola Partio (liberala). Ĝia disdonata voĉvarba gazeto „Gotlands Tidning” tute sen permeso aŭ avizo publikigis sur la unua paĝo la konatan portreton de la sveda KELI-propagandistino kaj represajon de ŝia kvinkolona artikolo pri Oosterbeek kaj Haarlem (la sola artikolo sen politika polemiko en tiu numero, do certe legita!). En la enkonduko la redaktoro substrekis la valoron de la kristana Esperanta laborado kaj la gotlandan originon de la aŭtorino, tiel provante kapti voĉojn i.a. por parlamentano Ahlsten, prezidanto de Sveda Misisa Federacio kaj kuzo de s-ino Alamo-Sandgren. Tio memorigas pri vera anekdoto el Ĉeĥoslovakujo: Kiam unu el la plej konataj kaj superaj svedaj ekleziuloj prelegadis en tiu lando, liaj afiŝoj devis porti la granditeran surskribon: „Pastro X estas persona konato de s-ino Alamo.”

Nu, s-ro Ahlsten reelektiĝis; kion alian atendi, kiam fervora socialdemokrato publike subtenas?! Strange tamen ke la reputacio de KELI ne sufiĉis por haltigi la ĝeneralan malprogreson de la Popola Partio! Post tiu ĉi mistero ne mirigos, se subite la Popol-Partio alian fojon publikigos s-inon Sandgren kiel sian kandidaton malgraŭ ŝia dekkvinjara rifuzado. Konsekvence tamen grava sekvo, ĉu ne, popolpartianoj? Nome, ke la Popola Partio faru subtenon al Esperanto en la sveda parlamento.

Same faru ĉiuj 25 parlamentanoj, kiuj estas membroj de Sveda Misisa Federacio! Do, la sendita bona honorario por la artikolo ne tute sufiĉas! Turnu vin senprokraste al la socialdemokrata parlamentano, samideano Einar Dahl!

### Esperanto en Dachau.

Septaga rapidkurso okazis en Dachau (Bavario), la 12.-20.10., sub gvido de s-ano von der Ley el Taillfingen. Estante hazarde en Dachau, li sukcesis instigi la gvidanton de distrikta junularondo (Kreisjugendring), kaplanon Josef Metzger, kiu informis la junularon. 17 ĝejunuloj (15- ĝis 17-jaraj) kaj la kaplano mem partoprenis la kurson; iun vesperon venis eĉ 40 interesitoj. En la loka gazetaro oni instigis la estron de la Popola Altlernejo, enkonduki Esperanton ekde januaro; s-ano Jolliet el Munkeno konsentis gvidi tiun kurson. Tiamaniere ankaŭ en Dachau, konata pro sia malbon-reputacia koncentrejo (sub la nazireĝimo), reviviĝis nia lingvo. — En Taillfingen (Virtembergo) mem s-ro von der Ley komencis novan kurson kun 15 personoj la 22.9.

### Esperanto en la dana rezista movado.

La Reĝa Biblioteko en Kopenhago ĵus aperigis 200-paĝan bibliografian verkon kun la titolo „Besaettelsestidens illegale blade og bøger 1940-1945” (La kontraŭleĝaj gazetoj kaj libroj de la okuptempo 1940-1945). Tiu verko i.a. preparolas la kontraŭleĝan gazeton „Danskeren” (La Dano), kiu aperis entute en 545.000 ekzempleroj, kaj kiun fondis kaj redaktis konata dana esperantisto. La verko mencias, ke oni priparolis la koncernan kontraŭleĝan gazeton en Dansk Esperanto-Blad (nov. 1946) kaj en Heroldo 1946 (n-roj 6, 7 kaj 8).

### Esperanto „magnifike” utiligebla, diras konata nederlanda verkisto.

Maurits Dekker ŝkribis en 1949 teatraĵon, sub la titolo: „De wereld heeft geen wachtkamer” (La mondo ne havas atendon). En 1951 ĝin tradukis F. Faulhaber en Esperanton. Multaj samideanoj ĝin legis, multaj ĝin jam vidis sur la scenejo, ĉar ĝi atingis ĝis nun preskaŭ 1500 prezentadojn en Nederlando, Belgujo, Germanujo, Izraelo, Danlando ktp., en diversaj naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

Antaŭ kelkaj monatoj (precize la 19-an de oktobro 1954) la dramo de Maurits Dekker trovis sian unuan prezentadon en la franca lingvo, en kiun ĝin tradukis s-ro R. Olivaux el la Esperanto-traduko. La prezentado, kiu okazis en teatrosalono „Bretagne” en Nantes, fariĝis granda sukceso.

La urba gazetaro akcentis speciale la fakton, ke la dramo estis tradukita en la francan lingvon el Esperanto. Jen kion publikigis *Le Populaire de l'Ouest* de 21.10.54: „Traduki el Esperanto teatraĵon verkitan en la nederlanda lingvo, — tio povus esti vetkonkurso. Pere de Esperanto estis necese esplori la psikologion de ĉiu el ĝiaj personoj, precize koncepti iliajn karakterojn, malkaŝi iliajn plej sekretajn subtilaĵojn. Unuvorte, ne sufiĉis redoni al la frazoj pure laŭvortan signifon sed, multe pli, estis necese rekrei ĉiun protagoniston, ne modifante iom de lia profunda naturo. Jen, sen rezervo, oni povas nur admiri la kompletan sukceson de s-ro Robert Olivaux.”

La *Résistance de l'Ouest* de 21.10.54 nomas la tradukon de s-ano Olivaux „ekscelenta”.

S-ro Loomans, nederlanda lingvo-instruisto, loĝanta jam ok jarojn en Francujo, konfesis ke „... leginte kaj komparinte la nederlandan tekston frazon post frazo kun la franca traduko elesperanta, mi estas mirigita konstatante la fidelecon, je kiu la vera senco, de la nederlanda teksto estas observita ... Esperanto neniel deformis la tekston nek la sencan de la tradukita lingvo ...”

Kaj, fine, kion diris la nederlanda aŭtoro mem pri la franca traduko elesperanta de sia verko: „... En via traduko vi konservis la ekzaktan enhavon de mia dramo ... Tio frapas min de pli, ĉar vi uzis Esperantan tekston. Tiel vi konfirmis al mi, ke la internacia lingvo estas magnifike (t.e. grandioze) utiligebla.”

Ni aldonu, por niaj legantoj kiuj ĝin ankoraŭ ne scias, ke Maurits Dekker ne estas esperantisto, sed li fariĝis granda amiko de nia afero kaj ne hezitas, konfesi tion publike.

### Semajnfino en Southport.

La Federacio de Lancashire kaj Cheshire (Britujo) okazigis semajnfinojn en Southport je la 23-a kaj 24-a de oktobro; partoprenis 55 personoj. S-ro D. Kennedy, vicprez. de UEA, estis la gastparolanto kaj faris tri paroladojn. En la unua prelego li detale klarigis la strukturon de UEA kaj la problemojn, kiujn la estraro de tempo al tempo devas fronti. En la dua prelego li prezentis bildon de la laboro de ĉiuj sekcioj de la movado. Parolante en la tria prelego pri la Midlothian-Eksperimento, li denove kaptis la atenton per sia interesa rakonto pri la historio de tiu grava eksperimento en Skotlando. Krom la serioza flanko de la semajnfino estis ankaŭ distra, en kiu la ĉestantoj partoprenis lerte aranĝitajn ludojn. (F. Parker.)

## NEDERLANDO


Ĉu vi konas Nederlandon?

Rigardu Nederlandon kun la fotografisto Ed. van Wijk kaj la ĵurnalistoj Mr. E. Elias, kaj certe estos al vi granda ĝojo ekkoni ĝin – aŭ rekoni ĝin.

Van Wijk migris tra la lando kaj prenis siajn fotojn ĉie, kie li vidis ĉarman loketon, belan fasadon kaj karakterizan anguleton. Kaj li ne kontentiĝis per aleoj, fasadoj kaj arbogrupoj, sed li kaptis ankaŭ tiujn homojn, kiuj estas tipe nederlandaj kaj kiuj harmonias kun la dekorado.

Mr. Elias ornamis ĉi tiun kolekton per agrablaj, poeziaj rakontoj pri grandaj kaj malgrandaj urboj, pri la trankvileco de la kamparo, pri la akvo kaj la floroj kaj pri la homoj. Li faris kernajn subskribojn por la bildoj.

Oni donos al la libro bonan lokon en la ŝranko kaj ne unu fojon, sed multajn fojojn elprenos ĝin. Romanon oni legas unu, du kaj eble tri fojojn. Poemon oni povas legi kaj ofte relegi. Sed bona bildlibro estas kamarado por la tuta vivo.



Prezo en Norda Ameriko: \$6.90, afr. Aktivaj Membroj de Universala Ligo rajtas aĉeti je favorprezo de \$6.20.

Mendu de:  
Esperanto League Book Service  
Middleton, Wisconsin

# MONDA

THE OLDEST CORRESPONDENCE  
AND EXCHANGE CLUB  
IN THE WORLD!

# LIGO

By Conrad Fisher



Although there are several international clubs using Esperanto among the national languages, or at least a few members use Esperanto, the oldest is Monda Ligo, whose membership today numbers only a handful of Esperantists among its some 14,000. This is directly opposite to its status in the early days of the club, between 1907 and the 1920s, when the membership consisted principally of Europeans. In the twenties, many Americans joined and the club carried on its activities mostly in English. However, here's what the President has to say today:

"This Club's present Officers, Associates, Representatives and members in 125 different countries have the most profound respect for the Esperanto language and for the various Organizations who promote this universal language and will cooperate to its fullest to help propaganda by publishing in our magazine 'World Hobbies' articles, grammar lessons, etc., seeing as we do the value and unlimited service this language does for all." Signed Franklin Crouch, President, August 11, 1954.

The club was first known as La Internacia Ligo, issuing its official "Monda Poŝto" in Esperanto, German and English, chiefly Esperanto. In the late twenties the preponderance of new members in the United States resulted in changes. The name became Monda Ligo; the Nomaro (membership list) combined with the yearbook and publications were in English entirely. In the early forties the magazine became World Hobbies with the yearbook retaining the old name Nomaro.

Mr. Crouch said in his letter to me: "The older members of Monda Ligo, i.e. those in active membership and office before 1928 were very faithful to promote Esperanto in all their letters, in magazine format and feature articles and this Universal Language was given much propaganda by them."

Monda Ligo members can be proud to be able to boast that the club has been in unbroken existence since 1907, a period of *forty-seven years*, just twenty years younger than Esperanto itself! (And five years older than I.) Its founder, Ferdinand Blechner, of Hamburg, Germany, was its first president. His term of office lasted from 1907 to 1918. The other presidents were: Jean Thalman, Zurich, Switzerland, until 1923; J. Harold Blackney, Saginaw, Mich., until 1940; Frank J. Falbaum, Ontario, Cal., until 1950; Edgar R. Apking, Ord, Neb., until 1953; then Mr. Crouch became president on the first of January, 1953. (He twisted my arm and made me join!)

I hope for two things. That other Esperantists will become interested in joining Monda Ligo and that my (and other members') contributions in World Hobbies will make it again as green as the ink on Mr. Crouch's typewriter ribbon! I hope that Monda Ligo will have a strong influence on making new Esperantists of its own members and others here in our country, which coincides perfectly with the aims of the Esperanto-Ligo.

For the benefit of our readers and members, the address is: Monda Ligo, Franklin Crouch, President, 4110 Roanoke Road, Kansas City, Missouri. League members should, at least, drop him a card and express our thanks and appreciation for their sympathy and collaboration





**Esperanto  
and Stamps**  
by *Conrad Fisher*  
RFD1, Meadville, Pa.

**AN ESPERANTIST AT A  
PHILATELIC EXHIBITION**

Three of us, members of the Meadville Philatelic Society, visited the annual exhibition of the Mahoning Valley Stamp Club, in Youngstown, Ohio, some time ago. It was a very interesting experience, because it was my first larger show.

The exhibition, held in the Butler Art building, consisted of two large rooms of framed displays and two rooms for the "bourse" or tables of the stamp dealers, who came from surrounding areas — a few from more distant places. Like all the rest of the collectors, I first examined the displays, among them my two frames of "Esperanto on Stamps". Then we spent the rest of the day at the dealers' tables, where I initiated them into awareness of the fact of Esperanto and its stamps. I found a plentiful supply of the two Austrian stamps and at one table I found many copies, unused, of the postal card bearing the 1949 Austrian issue imprinted. I was unaware of its existence, before. A different first-day cover with three rows of figures in national costumes separated by the legend (in English!) **ESPERANTO — CONGRESS—VIENNA — JUNE 1949**. One dealer had several copies used.

Several dealers had a hard time understanding just what I was after and I had neglected to bring along a checklist of the issues. But they each received leaflets on Esperanto. (I felt the lack of a suitable one aimed at collectors.) However, when I told them the names of the countries which issued them, they gave me books and albums to remove the stamps from. In some, the illustrations of the stamps weren't always covered by their stamps, but I found the USSR first issues and the one showing the portrait of Zamenhof and, of course, the Austrian of 1949.


I got the impression that Esperanto stamps are not hard to find at such an exhibition. Furthermore, the dealers told me to send them the list of the issues and they could fill them. So anyone of our readers or their friends may write to me for dealers' addresses.

**NEED PUBLICITY MATERIAL?**

We have publicity leaflets on Esperanto to use in your promotional campaigns.

Free on request, as long as we have the mazuma to print and send them. Write to: F.R. Carlson, 2116 N.35 St., Seattle 3, Wash.

**THE INTERNATIONAL ESPERANTO MUSEUM IN VIENNA**



Parto de la „Konstanta Ekspozicio“ en IEMW

We would like to tell our readers about a unique institution. It is our international museum in Austria. It issues a quarterly "informilo", which is sent to its member-patrons all over the world. Its pantheon of Esperantists, permanent exhibit and reading room are open every Monday, Tuesday and Friday, from 9 a.m. to 3 p.m.

Members of the Museum are classified into three categories:

*Meceno*: a person who contributes fifty international reply coupons or value (\$6), receives the "informilo" for three years and is entered into the pantheon of Esperantists forever;

*Dumviva*: a person who contributes 25 coupons (\$3), receives the "informilo" for two years and also enters the Pantheon;

*Subtenanto*: sends each year six coupons (72¢).

Each new member receives a picture of the Museum, which is located in the Austrian National Library and is under the protection of the Austrian government.

The head of the Museum, Kortega Konsilanto H. Steiner, begs everyone to send him copies of new Esperantaĵoj: books, photos of Esperantists and their meetings, clippings, *propagandiloj*, Esperanto stickers, etc., in other words, anything relating to Esperanto or related subjects.

The address of the Museum is:  
Internacia Esperanto-Muzeo en Wien:  
Wien I, Hofburg, Austria.

**Pri Dirk Brink:**

En la pasinta numero ni publikigis artikolon pri Dirk Brink, kune kun bildo de li kiel militkaptito, sed sen montri lian nunan aspekton. Do, en la foto sube, jen Dirk, dekstre. Maldekstre estas konata aviadil-konstruisto, D-ro Bartsch.



# NORD-AMERIKA MODERNA MUZIKO

De Elwyn C. Pollock



**Finalo:**

## HORO DE Nuntempaj voĉoj

En la prezentado de nuntempa muziko tio, kion oni efektive ŝatas, estas afero de sento; sento kiu eliĝas kiel respondo al la esprimebla kvalito kaj kuniĝo de la muzika mesaĝo. Demando pri persona prefero bezonas respondon rilate ŝaton kaj malŝaton, kiuj laŭnecese estas alte subjektivaj.

Ĉetere, estas eble, ke oni havu grandan respekton por muzika verko kiel ankaŭ rekonu, ke ĝi posedas elementojn de esenca valoro, kaj tamen ne respondu al ĝi kun varma persona sentado. La komponado estas kaj arto kaj metio kaj troviĝas multe da samtempa muziko kun admirinda metico sed kies esprimebla signifo estas malfacile kaptbla.

La fakto, ke ĉiu generacio emas forĵeti la muzikon de sia propra tempo, kiu poste troviĝas akceptebla, sugestas, ke oni rekonu la gravecon de liberaleco al nova muziko, malgraŭ la fakto, ke sendube ekzistas multaj samtempuloj kiuj similas parolanton, spertan en la arto kaj uzado de la lingvo, sed ne havante la kapablon multon diri.

La funkcio de simfonia orkestro estas edukika kaj natura, kaj la repertuaro devus reprezenti ĉiujn periodojn kaj stilojn, kiel ankaŭ nuntempan muzikon, ĉar estas afero de intelekta honesto rekonu, ke troviĝas muziko komponata dum la hodiaŭa tago, kiu estas bone verkata, respektinda, kaj tial aŭdinda.

### Roy Harris

Roy Harris devenas de Oklahoma kaj, kiel lia muzika Walt Whitman, li estas plena ĝe sento de destino. Je la aĝo de 23 li estas

gvidanto ĉe la Los Angeles Filharmonika, nur por ke li povu aŭdi la koncertojn; samtempe li studas orientan filozofion, kaj ĉiam li komponas. Li supersaltis breĉojn en sia muzika scio, ĉar liaj ideoj ne povis atendi ĝis la konstruo de konvencia ponto. Kiam oni komencis ludi la komponaĵojn de Harris kaj rekoni lin kiel geniulon, novaj oportunaĵoj malfermiĝis al li. Dum iom da tempo li laboris ĉe la McDowell kolonio; li vojaĝis al Parizo por studi kun Nadia Boulanger. Post la returno li trovis la vivadon en Ameriko malfacila pro tio, kion li nomas mankon da historia perspektivo. Tie ĉi, li kredis, la supozado, ke la tuto de la granda muziko de l' mondo estas jam komponita, rezultigas sintenon, ke ju pli serioza la komponisto, des malpli li fariĝas responda al la socia strukturo! Hodiaŭ, tamen, post la evoluado de tiom da granda muziko en Ameriko, oni ĝenerale ne plu tenas tiun pozon. Hodiaŭ Roy Harris estas "Composer-in-residence" (komponisto enloĝanta) ĉe la Peabody kolegio por instruistoj.

### John Alden Carpenter

La muziko de John Alden Carpenter estas karakterizata de facile distingeblaj trajtoj, el kiuj oni ĉefe rimarkas komikan fantazion, delikatan, et poezian, humoron kaj dolĉan sentimenton. Li estas komponisto, kiu provizas muzikon kun evidenta ĝojado, kaj kies rapida; impulsoj estas regataj de bongusto.

### Paul Creston

Freŝeco en ideoj, lertaj koloroj, kaj iu racia brileco ŝajnas pruvi, ke Paul Creston komponas ne nur pro tio, ke li posedas teknikon, sed ĉefe ĉar li sentas kreigan urĝon. Lia muziko celas al la abstrakta kaj la absoluta, kaj ĝenerale inklinas al pure formalaj linioj, por ellabori konceptojn tute en muziko-termoj prefere ol elvoki bildojn aŭ rakonti historion. "Mi rigardas muzikon kiel lingvon kiu komenciĝas ĝuste tie, kie la voĉa lingvo finiĝas!"

"La muziko troviĝas en stato de malpliigo! Tiu ĉi stato reflektas la konfuzon en la mondo, kiu havas nenian rekoneblan estonton. Kiel komponisto, mi kredas, ke

la kreartoj kiel ankaŭ ĉiuj branĉoj de lernado devus servi kiel instrumentoj por morala kaj spirita renesanco. Se oni ne akceptos ĉi tiun alvokon, la espero de l' homaro por liberiĝo de timo ĉiam estos iluzio!" *Norman Dello Joio.*

### Walter Piston

Walter Piston estas amerika komponisto parolanta la internacian idiomon de absolut-muziko. Li komponas multajn verkojn, i.a., pianajojn, ĉambromuzikon, orkestro-sŭitojn, du simfoniojn, koncertojn, muzikon por la baletto, kaj ankaŭ eldonis libron pri muzika teorio: "Principoj de Harmonia Analizo."

### William Schuman

William Schuman diras, "Mi sentas, ke mi devas komponi muzikon, do mi komponas." Li estas fekunda komponisto. Ĝis nun li komponis kvin simfoniojn, koncerton por piano kaj orkestro, kaj "A Free Song", teksto de Walt Whitman, kiu ricevis la Pulitzer premion. De 1945 li estas prezidanto de la Julliard School of Music.

### Deems Taylor

Deems Taylor: Sŭito "Through the Looking Glass", de Alice en Mirlando. Iom miele dolĉa, et sentimentala, sed ĉiam aŭdinda. Tre lerta partituro. Estas plezure trovi amerikan komponiston de talento, kiu volonte komponas muzikon kiu estas gaja, ne antaŭsigna; kies fantazio estas delikata; kiu uzas grandan orkestron diskrete, ne ĉefe por fari tondran bruon.

### Randall Thompson

Randall Thompson estas unu el la plej bonaj metiistoj inter amerikaj komponistoj. Kion ajn li elfaras, estas bele konstruita. Lia stilo, malpli disonanca ol tiuj de Copland kaj Harris, estas pli melodia, sed la muziko estas tamen amerika en spirito.

## Virgil Thompson

Virgil Thomson estas nia muzika satiristo. Dum li estis ankoraŭ tre juna li instruis muzikon ĉe Harvard, kaj ludis la orgenon ĉe King's Chapel, Boston. Lia simfonio pri Himno-kanto estas rekta, kaj folkloro en stilo, elvokanta kamparan amerikon per la digno, dolĉeco, kaj ĝia naiva religia ĝojeco. Paul Rosenfeld foje ĝin komparis al "Currier & Ives" presita bildo.

Kaj nun — obeeme aŭskultinte, ni supozu, kara leganto, ke vi ankoraŭ ne ŝatas ĉi tiun novan muzikon. Aŭskultu do denove, kelkfoje. Kaj tiam se vi estas absolute certa, ke vi ne ĝin ŝatas, ne timu por tiel diri. Vi ne timu esti malprava. Plue, se vi malŝatas unu ultramodernan verkon, ne supozu, ke ne ekzistas por vi iu alia tia verko. Aliflanke, ne supozu, ke ĉiu nova muziko, kia ajn monstra, estas voĉo de l'estonto. La proporcio de fuŝa muziko komponata hodiaŭ estas ĉiam sama kiel en la pasinto, nome ĉirkaŭ 90%.

Komponistoj hodiaŭ eksperimentas kun nova muzika lingvo. Eĉ ĝis nun ne ekzistas taŭga vortaro por ĝi, nek ia maniero por ĝin studi, krom la aŭskultado, t.e., por ĝin aŭskulti sen paniko aŭ mensa rezervado.

Ju pli ni aŭskultas, des pli bone ni povas pesi kaj estimi la valoron de la dirado de niaj nuntempaj komponistoj. Iuj el ili parolas sensecaĵojn, sed aliaj eble parolas pri io valora, io, kion ĉiu el ni — iutage — eble estus dankemaj por aŭdi.

(Red.: Por tiuj, kiuj deziras Esperantigi sian scion pri muziko, ni rekomendas la libron "Muzika Terminaro", de Butler kaj Merrick, 25¢ ĉe Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)

## FRED RIVERS, PIONIRO

De Lehman Wendell

(Ĉi-sube komenciĝas serio da artikoloj pri la fruaj tagoj de la Esperantomovado en Norda Ameriko.)

Inter la jaroj 1902 — 1914 mi loĝis en Tacoma, Vaŝingtono. En la jaro 1907 mia frato vizitis nin kaj apenaŭ li estis enirinta la domon kiam li diris al mi, "Ĉu vi scias ion pri Esperanto?" "Ne," mi respondis, "ĉu ĝi estas nova sapo aŭ eble razilo?" "Ne," li ridis, "ĝi estas konstruita lingvo bazita sur la ĉefaj lingvoj de la mondo. Ĝi estas rimarkinde simpla, facile lernebla, kaj per ĝi vi povas korespondi kun homoj en ĉiuj partoj de la mondo."

Mi tuj entuziasmiĝis kaj tiun saman tagon ni vizitis librovendejon kaj aĉetis gramatikojn kaj vortarojn. Fervore mi komencis studi Esperanton tiun vesperon, kaj eĉ hodiaŭ, 1954, mi konservas miajn intereson kaj fidon en la lingvo.

Post kelkaj semajnoj nia fratino kaj du amikoj kune studis Esperanton, kaj iom poste ni troviske ekzistas Esperanto-klubo en Tacoma. Ni tuj aniĝis. La prezidanto kaj instruisto estis S-ro Fred Rivers. Ni trovis lin tre afabila, bonkora, klera viro, kaj baldaŭ konstatis, ke li estas idealisto, kiu pensas pli pri siaj amikoj ol pri si mem. Humileco estis lia forto. Kiel instruisto li lerte gvidis la membrojn de la klubo kaj samtempe perfektigis sin mem en la uzo de Esperanto. En lia klaso sin trovis, inter aliaj, Juĝisto J.M. Arntson, presisto J.W. Wood, Dan Gibson, D-ro C.E. Case, S-ro Applegate, blinda samideano kiun ni ŝerce nomis Pompordego.

Post ĉirkaŭ unu jaro (la ekzaktan daton mi ne memoras) S-ro Rivers sentis sin sufiĉe sperta en la uzado de la lingvo, kaj unu vesperon li informis kelkajn membrojn de la klubo, ke li intencas publikigi literaturan Esperanto-gazeton. Eventuale la unua numero aperis sub la nomo La Simbolo. La presisto kaj bindisto estis S-ro J.W. Wood (nomata Ligno), kiu estis la posedanto kaj administranto de sia propra presejo, The Acorn Press, kiun li ofte nomis La Glano-presejo.

La Simbolo, kiu havis poŝgrandecan formaton, estis bele presita kaj ni ĉiuj fieris pri la bela nova gazeto. La plej lertaj Esperantistoj en Tacoma, Seattle, Portland kaj aliaj okcidentaj lokoj kontribuis

al La Simbolo. Aliaj gazetoj tra la mondo laŭdis la novan gazeton, kaj D-ro Zamenhof, fondinto de Esperanto, skribis gratulan karton al S-ro Rivers.

Post unu jaro, se mia memoro ne tute trompas min, S-ro Rivers informis nin pri la vera celo de La Simbolo. Per ĝi li esperis altiri al si samideanojn el ĉiuj partoj de la mondo, por ke ili fondu kooperativan kolonion, kies oficiala lingvo estu Esperanto.

Unu tagon S-ro Rivers invitis min viziti lin. Li multe parolis pri sia kolonio. Ĝi devus havi komunan mangoĉambron, sed samtempe ĉiu domo devus havi malgrandan kuirejon por tiuj homoj, kiuj preferus manĝi ĉeĥejme. La kolonio ankaŭ devus havi komunan lernejon kaj unu komunan preĝejon.

Pri religio li havis sian propran kredon. "Neniu kolonio," li asertis, "povas longe ekzisti sen religio. Same kiel Esperanto povas servi al ĉiuj homoj, tiel same mia religio devas esti tiel simpla kaj inkluziva, ke ĝi povas esti akceptata de ĉiuj samideanoj."

Li silentis momenton kaj rigardis min per strange brilantaj okuloj, tiam li daŭrigis, "Mia religio devas havi belan ritualon por ke ĝi plaŭdu al la membroj. Mi estos la ĉefpastro kaj dum Diservo mi portos belajn luksajn vestojn por kontentigi la adorantojn, ĉar belaj vestoj kaj bela ritualo aldonas al la amo al Dio." Li ree silentis por konstati ĉu mi akceptas liajn ideojn, tiam li daŭrigis sian parolon. "Kiel mi diris, mi estos la ĉefpastro, sed oni bezonas duan pastron, kies vestoj ankaŭ estu luksaj kaj belaj, sed ne same belaj kiel la miaj. Mi deziras ke vi, kara amiko Wendell, estu la dua pastro."

Mi estis tute konsternita. Mi ne kredis je lia kolonio, kaj certe mi ne volis esti pastro sed, ne dezirante ofendi lin, mi respondis, "Vi flatas min, Sinjoro Rivers, kaj mi dankas vin multe, sed mi timas ke mi ne povas akcepti vian proponon. Vi eble ne scias ke mia frato estas pastro; krom tio mi havas du bofratojn, kiuj ankaŭ estas pastroj, kaj se mi nun alprenus alian religion ili neniam pardonos al mi."

Nu, La Simbolo ne akiris sufiĉe da abonantoj. Krom tio, ne multaj eksterlanduloj montris intereson en nova kolonio. Pro financaj malfacilaĵoj la gazeto fine mortis, kaj kun ĝi mortis la esperoj de Rivers. Li fine iris al Kalifornio kie li mortis for de siaj amikoj. Tiamaniere ofte finiĝas la vivo de homo kies revoj estas utopiaj.

### THE ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE

Middleton, Wisconsin

Poemoj de Omar Kajam, Waringhien, paper, 60 pp. \$ .85	
Historio de S.A.T., paper, 152 pages	1.30
Sennacieca Revuo, 1952 3 4, each:	1.00
Aŭskultu la Voĉojn de Oceano, paper, 53 pages	.45
Kvaropo. Auld, Dinwodie, Francis, Rossetti, paper, 267 pages	1.50
La Arto Fariĝi Centjara. Wegner, paper, 59 pp.	.50
Sveda Novelaro	1.50
Interpopola Konduto, Privat	1.00
La Gaja Podio, Schurutz	1.40
Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj, cloth, ill., 304 pages	2.50
La Bapto de Caro Vladimir Borovskiy, 141 pages	1.50
Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto, Stojan	.70
La Nuna Stato de l' Eŭoluismo, Rostant, cloth	1.00
Triesto al Kiu? paper, 44 pages	.50

Write for complete listing

## An Introduction to ESPERANTO

the International

Esperanto is a simple language developed by the first published in Esperanto" (one who has since been known

Esperanto is not an artificial language. It uses the same basic word-material from which the modern languages have been formed. It does, however, differ from all other languages in the following important respects:

(a) It is perfectly phonetic. Each letter has a single sound; there are no silent letters and no double letters in Esperanto root-words.

(b) The accent is always on the next-to-last syllable.

(c) A highly simplified grammar (there are only 16 simple rules and *no exceptions!*) makes it extremely easy to learn and to use correctly. Parts of speech are identified by the ending. Nouns are formed by adding *o* to the root-word; adjectives by adding *a*, and adverbs by adding *e*. The

## An Introduction to ESPERANTO

the International Language

Esperanto is a simple but complete language developed by Dr. L. L. Zamenhof and first published in 1887. Signed "Dr. Esperanto" (one who hopes), the language has since been known by this name.

Esperanto is not an "artificial language". It uses the same basic word-material from which the modern languages have been formed. It does, however, differ from all other languages in the following important respects:

(a) It is perfectly phonetic. Each letter has a single sound; there are no silent letters and no double letters in Esperanto root-words.

(b) The accent is always on the next-to-last syllable.

(c) A highly simplified grammar (there are only 16 simple rules and *no exceptions!*) makes it extremely easy to learn and to use correctly. Parts of speech are identified by the ending. Nouns are formed by adding *o* to the root-word; adjectives by adding *a*, and adverbs by adding *e*. The

Tre Estimataj Gesamideanoj:

La Esperanto-Ligo por Norda Ameriko deziras helpi al ĉiuj (ELNA-anoj kaj aliaj), kiuj volas antaŭenigi Esperanton. Tiucele, ni presas kaj senpage dissendas ĉi tiujn informilojn pri Esperanto. Se ni povos alimaniere helpi pri loka propagandado aŭ organizado, ni ĝojos fari tion.

Tiuj ĉi servoj postulas monon. Se vi dezirashelpi prilakostoj, vi povos (1) varbi membrojn por la Ligo, (2) sendi mondonacojn al la Liga kasisto (Edw. W. Pharo, Jr., "Nur", County Line Road and Simms, Somerton 16, Pa.), (3) se vi preferas, sendi donacojn rekte al la presisto (adreso mal-supre) por plibonigi lian kapablon presadi por Esperanto.

SED, se vi ne deziras donaci monon, ne deziras varbi membrojn por la Ligo, eĉ ne deziras mem esti membro de la Ligo, *sed volas labori por Esperanto*, ne hezitu pri uzo de niaj servoj. Kunlaborante, ni iru al la venko!

Mendu foliojn ĉe: F. R. Carlson,  
2116 N. 35 St., Seattle 3, Washington.

Knowledge of a second language is a valuable cultural asset. Why not begin now to study and use Esperanto? In this country, Esperanto is furthered by the Esperanto League for North America, which publishes the bi-monthly magazine, *The North American Esperanto Review*. Membership, including the magazine, is only \$3 a year. The magazine alone \$1.75. Write to:

Esperanto League for North America, Inc.  
R.F.D.1, Meadville, Pa.

North American Esperanto Review  
3412 No. Mullen St.  
Tacoma, Wash.

Return Postage Guaranteed